

La Esperanto-Gironde Informilo

SEPTEMBRO 2023



N° 172

# Promesplena somerfino



# ESPERANTO-GIRONDE

## KUNVENO en Maison de quartier Pessac Bourg en PESSAC

### la 11an de junio 2023

### de la 10a 30 ĝis la 16a



Ceestas: Annie kaj Ĵanseb Brilleaud, Elvezio Canonica, Janine kaj Yannick Dumoulin, Martine Edelbloude, Katya Gradzion, Olivier Moreno, Klodin' Pomirrol, Marcelo Redoulez, Eric Tiffon

Senkulpigitaj: Gloria Gargallo, Hervé Giranton, Joël Lajus, Lucienne Laroche, Dominiko Martins, Bernardo kaj Rose Sarlandie, Jean-François Seyler, Fernando Torres

Elvezio bonvenigas ĉiujn.

#### **1/ Adreso de la sidejo de Espéranto-Gironde**

Elvezio rigardis la retejon de Espéranto-Gironde: la adreso devas esti ŝanĝita.

Marcelo: Estas diskuto pri la daŭrigo de la tradukrondo, kie restos nur 3 personoj post la foriro de Martine. Ĉu ni restos kun adreso en Cenon? La nuna urbestro ne specife favoras al Esperanto. Do ni devas pripensi, ĉu ni devas/ povas trovi alian urbon por la sidejo...

Klodin': Ĉiu cenona asocio devas de nun prezenti tutan kompletan jaran kalendaron por la planitaj kunvenoj: ni ne povas tion fari. Ĉiu asocio rajtas nur tri kunvenojn jare en la asociaj salonoj. Ĉiuj salonoj estas fermitaj dimanĉe.

Elvezio: Oni oficialigu la ŝanĝon de kasisto okaze de la ĝenerala asembleo en oktobro aŭ novembro.

#### **2/ La retejo kaj la Framalisto**

Yannick: Estas strangaj misfunkciadoj en la listo: kiam oni ricevas mesaĝon, se oni alklakas « Répondre » aŭ « Répondre à tous », nur aperas kiel ricevonto la nomo de la sendinto.

Janine: Tio estas des pli ĝena, ke la logmesaĝo por partopreni en la listo asertis, ke neniam neniel aperas la personaj retadreso en la interŝanĝoj de mesaĝoj.

Yannick: Oni povus krei limigitan liston de membroj, kiuj kutimas ĉeesti la kunvenojn.

Jean-Seb: Eble oni atendu, ke plene vivu la unua listo antaŭ ol krei duan.

Marcelo: Ni trovu sufiĉe gravan projekton, en kiu partoprenu la membroj de la listo.

Elvezio: Ekzemple la Turisma GvidLibro.

Janine: Monique proponis, ke oni uzu la slipojn de la Turisma GvidLibro (TGL) por meti en venontajn numerojn de LEGI. Jen la historio: por la kongreso de France Espéranto kaj de la Fervojistoj en Artigues en 2013, Espéranto-Gironde preparis slipojn pri vizitotaj lokoj. Poste venis la ideo daŭrigi la starigon de slipoj pri regionaj

vidindaĵoj, cele al kolektado en ring-dosierujojn. Pluraj estis pli malpli pretaj por eldono, en specifa modelo, kiu bedaŭrinde ne konvenas por meti en LEGI. Kelkaj slipoj, ne verkitaj laŭ la «oficiala» modelo, jam aperis (1). La ceteraj, sufiĉe multnombraj (ĉirkaŭ tridek), ne estis vere kontrolitaj kaj bezonas zorgan kontrolon kaj bildojn. La kontrolo estu duflanka: pri la lingvo kaj pri la ĝusteco de la informoj, ĉar preskaŭ ĉiuj slipoj datumas de la jaroj 2014-2015 kaj nepre estu aktualigitaj. Do impona laboro. Ni povos sendi al la framalisto proponon por kontroli kelkajn artikolojn.

La projekto estas kvazaŭ felietone publikigi slipojn de la TGL en speciala rubriko en venontaj LEGI.

Yannick: Oni povas publikigi la jam pretajn slipojn en la reto, kie ili estos facile elŝuteblaj.

### **3/ Pri Brassens**

Yannick: Bedaŭrinde estas malmulte por diri. En marto li parolis kun Patricia Escalda, kiu fiksas la publikigon de la libro en marto 2023. De tiam neniu novaĵo. Yannick multfoje provis telefoni sed atingis nur la respondilon. Dufoje li lasis mesaĝon sed sen rezulto.

Marcelo: Restas trideko da ekzempleroj de la lasta eldono.

Post la manĝo ni cerbumas pri lingvaj problemoj starigitaj de Marcelo rilate al la tradukado de *Jacquou le Croquant* far grupo, en kiu li partoprenas.

Poste, antaŭ la komuna foriro, Marcelo prezentas la ludon pri floroj al Olivier kaj Eric.

La venonta kunveno okazos la **24an de septembro**.

(1) Ekz. en nro 146: la Labor-borso de Bordojo - en nro 159: Bastidoj - en nro 164 kaj sekvaj: La mumioj de Bordojo - en nro 165: La 150-jara visterio de rue du Loup - en nro 169: La flanko de Garono.

*Janine*



## ESPERANTO-MOVADO FUNEBRAS FORPISIS MONIQUE ASSAILLY la 30an de julio 2023

**M**onique ne estis membro de Esperanto-Gironde sed de nia najbara Niorta NaturAmika sekcio. Ŝi fidele kun-kantis kun La Kompanoj.



Klodin' kaj Marcelo partoprenis la funebron de Monique en la Niorta kremaciejo. La ceremonio estis tre kortuŝa. Nepompa sed simpla kun tre valoraj tekstoj, kiuj bele prezentis Monique, kia ni konis ŝin. La familianoj celis reliefigi kvin facetojn de ŝia vivo. Unue ŝiaj du nepinoj rakontis la familian amon. Due la ateliero pri verkado en kiu ŝi partoprenis dum multaj jaroj duvoĉe legis unu el ŝiaj tekstoj pri la temo «nekutima renkonto». Jen migrado sur la fama korsika pado GR20 kun surpriza alveno de kavaliro, ŝajne rekte rajdanta el vakerfilmo: sur tute nigra ĉevalo, li surhavis vastan ĉapon kaj fusilon... Poste NaturAmikino montris sian emocion raportante la gravan rolon de Monique en la loka movado. Sekve mi legis la ĉi-postan dediĉon kaj ĝian tradukon. Fine parolis la vilaĝestrino de St-Pompain. Tre digne ŝi salutis la ĝisfine pluaktivan eksinstruistino, kiu pluengaĝiĝis en projekton kun la lernejo ekde venonta septembro. Inter ĉiuj intervenoj aŭdiĝis muzika peco. Post la mia parolado, la kanzono de la «Lonicerio» de Kajto. Dum la tuta daŭro multaj fotoj sinsekve sur ekrano koline lumis. Fortaj emocioj plu esprimiĝis dum la komuna lasta silento, la unuopaj omaĝoj ĉe la ĉerko kaj poste, ekstere.



## Kelkajn vortojn nur...

Kelkajn vortojn nur  
Kiel murmur'  
Por ci, kara Monik',  
Kelkajn vortojn nur  
Kiel susur',  
Flustro de NaturAmik'.

Ja Esperanto akompanis  
Ciajn fratecajn idealojn  
Migre sur montojn aŭ en valojn,  
Kantante kun la Kompanoj.

Kaj dum refloros natursorĉe  
Ciaj instruoj sur la padoj,  
De l' solidaraj kamaradoj  
Plutenos ni la viv-torĉon.

Kelkajn vortojn nur  
Kiel murmur'  
Por ci, kara Monik',  
Kelkajn vortojn nur  
Kiel susur',  
Flustro de NaturAmik'.

*Marcelo*

*L'Hortie, la 1an de aŭgusto 2023  
Al ĵusforpasinta, karmemora  
Monique Assailly*

## Quelques mots seulement

Quelques mots seulement  
Comme un murmure  
Pour toi, Monique  
Quelques mots seulement  
Que susurre  
Le souffle d'un Ami de la Nature.

Oui, l'espéranto a accompagné  
Tes idéaux de fraternité  
En randonnée en montagne, en plaine  
En chanson avec Les Copains.

Et tant que reflouriront par  
enchantement de la nature  
Tes enseignements au bord des  
chemins,  
Nous porterons plus loin le flambeau  
Des camarades solidaires.

Quelques mots seulement  
Comme un murmure  
Pour toi, Monique  
Quelques mots seulement  
Que susurre  
Le souffle d'un Ami de la Nature.

AMIS  
DE LA NATURE





## REJUNIGA 96A SAT-KONGRESO 2023 EN GREZILJONO

**K**iel plaĉas skribi entuziasman raporton pri evento, en kiu ni sincere plene ĝuis! Klodin' kaj mi travivis de la 18a ĝis 23a de aŭgusto internacian kongreson, kian de tro longe mi ne plu vizitis. La nombro de partoprenintoj igis la aferon intima. Iom pli ol kvindeko da geesperantistoj - *ne konstante* - kuniĝis en la kastelo de Greziljono, ideala por tiu cirkonstanco. Tiu simbola loko ŝarĝita de movada historio imponis. Tuj rimarkinda estis la multeco de la originoj de la ĉeestantoj: tri kontinentoj, dekdu landoj! Krom Francio (*pli-malpli 40%*), Germanio, Svisio, Britio, Irlando, Hispanio, Portugalio, Grekio, sed ankaŭ Usono, Ĉinio, Koreio (*aparta okulumo al tiu eksterordinara kvinopo*) kaj Aŭstralio!



*Vizito al la anĝeva kastelo. Kyina, Neil, Jesa, Sandor, Haesim, Marcelo kaj Kanguruo: tri kontinentoj sub la verda flago.*

Kvankam iel lastmomente ordigita, la programo estis tre riĉa, la debatoj intereseĝaj kaj la etoso malferma, amika, solidara, familieca. Juneca, dank' al grava proporcio de gejunuloj en la kunvenoj, ide-interŝanĝoj kaj prezentado de pluraj programeroj.

Mi retrovis tie la spiriton de la SAT-kongresoj, kiujn mi konis sur la kampadejo de Lekturo en 1978, sub la atomŝirmejo en Bazelo en 1981, en la klasĉambroj de lernejo en Iisalmi en 1982, aŭ sub la tendego en Artigo-apud-Bordoza en 1984. Eĉ tiun de la unua SAT-JF renkontiĝo en Villandraut la saman jaron. Ja kompreneble en tiuj jaroj la SAT-kongresoj kunigis pli ol 250 gelaboristojn. Sed samkiel tiam la kvindeko de la ĉi-jara renkonto sentis kaj elmontris feliĉon troviĝi kune. Ja ankaŭ antaŭ kvardek jaroj estis granda plezuro trovi jam delongajn geamikojn. Kaj same novalvenintoj estis kore bonvenigitaj, tuj akceptitaj, de ĉiuj. La konversacio facile enkondukiĝis. Kaj fortaj rilatoj teksiĝis. Mi scias, ke tro malmultaj homoj nun

povos kontraŭdiri tiujn vortojn - ĉar granda plejmulto jam forpasis. Nu, eble tial mi kuraĝas esprimi miajn hodiaŭajn sentojn. Sed la Greziljona kongreso rekirlis ĉiujn tiujn ingrediencojn, kiuj sukcesigas SAT-kongresojn. Komunaj transportadoj, spontanaj helpoj en la kuirejo kaj improvizitaj kunkantadoj en buso, ĉe tablo aŭ ĉirkaŭ gitaro, senperaj kuntrinkadoj kaj noktumadoj. Jam en Barcelono tiu vivo revigliĝis, bedaŭrinde la kronviruso tuj poste neniigis ĝian efikon.



*Vesperumado: Revoluciaj kantoj ĉirkaŭ la gitaro de Ana Ribeiro*

Ne kredu, ke mi veas pro nostalgio de la junaĝo. Male! Mi nur simple volas atesti la retrovon de energio, kiun la pasintaj jardekoj ŝajne emis stompece svenigi iom post iom. Ja al ni mankis tiuj rektaj kontaktoj post plurjara nur distanca traekrana ekvido. Sed ĵus revenis en mi (*sed ne nur*) la petolemo, la agemo, la konscio pri la forto de Esperanto, kiam ĝi estas uzata por humanecaj celoj. Reŝprucis ankaŭ forironte jam la granda deziro kiel eble plej baldaŭ trovi sin denove ie sur la verda vojo... kun la bedaŭrego, ke la deĵoro en la laborejo tro frue revokis min al devigaj taskoj antaŭ fino de la semajna kunĝuo kaj ĝia lasta vespero titolita «Revoluciaj luktokantoj!».

Fine, se unu el la partoprenintoj mi nomu en tiu mallonga raporto, elstare mi sendu kison al Margo! Tiu anĝeva dudekdumonata pupo ravis la tutan kongresanaron kaj al ŝi mi deziras, ke laŭlonge de sia vivo ŝi pluvivu multajn tiajn kongresojn, kian la SAT-kongreso 2023 en Greziljono.

*Marcelo - SAT-membro 32846*

P.S.: Venontaj SAT-kongresoj: 2024 en Oporto (Portugallio)  
kaj 2025 en Osako (Japanio).

Oficiala kongresfoto videblas ĉe: [https://eo.wikipedia.org/wiki/96-a\\_SAT-Kongreso\\_2023](https://eo.wikipedia.org/wiki/96-a_SAT-Kongreso_2023)

*Stelulino Margo Markov, filino de Vito kaj Paŭlino*



## APOTEKO EN LA MALSANULEJO HÔTEL-DIEU DE BAUGÉ (49) 350 jaroj da historio

**O**kaze de la SAT-kongreso 2023 en Greziljono, amikinoj Klodin' Pomiról kaj Claudine Gueguen ĉiĉeronis por nekutima vizito de la apoteko en la malsanulejo de Baugé.



Tiun viziton jam delonge planis la kongres-organizantoj kaj ĝin devus gvidi profesia gvidistino. Sed unu monaton antaŭ la kongreso ĉi lasta devis rezigni partopreni la kongreson, ĉar ŝi rompís al si oston. Vinko do lastminutan solvon serĉante sin turnis al la du Klodin'. Trafa ideo: ili ne sukcesis rifuzi la veton. Klodin' esploradis diversajn retejojn, sintezis kaj tradukis la ĉi-postan tekston. Claudine kunportis la kostumojn kaj sian entuziasmon por valorigi la tuton. Kaj la vizito iĝis granda sukceso!

### **1- Alvenante: (enkonduko)**

La malsanulejo *Hôtel-Dieu* de Baugé estas antikva hospitalo, fondita sub la regno de la tiel nomata Sunreĝo Ludoviko la 14-a en 1650. Ĝi posedas unu el la plej malnovaj kaj plej bone konservitaj apotekoj en Francio. Ĝi estas bela pruvo de tio, kio estis farmaciejoj en la 17-a jarcento. Menciindas, ke du virinoj, Marthe de la Beausse kaj Anne de Melun, origine instigis ĝian ekziston. Kaj sekve la fleginstituto ĉiam estis administrata de monaĥinoj. La definitiva fermo de la malsanulejo okazis fine de la 20a jarcento. Tiam ĝi fariĝis memorloko nun vizitebla. Specife, ni vidos la apotekon.







## **2- En la ĉambro mem: (apoteko)**

Tiu farmaciejo estis aranĝita kaj meblita ĉirkaŭ 1675. Ĝi ankoraŭ funkciis en la 1940-aj jaroj. Ĝi estis unue enskribita en la inventaro de la Historiaj Monumentoj en 1916 kaj estis klasita kiel Historia Monumento en 1947.

La vorto «apoteko» trovas sian etimologion en la greka vorto «apothèkè», kiu signifas loko, kie oni gardas, konservas, kaj en la latina radiko «apothecarius», kiu tradukiĝas kiel butikisto. Tial temas pri ĉambro, en kiu oni konservas la kruĉaĵojn kaj kuracilojn.

Tiu ĉambro rolas centran funkcion por la hospitalo. Ĝi estas tre impona. Temas pri granda ĉambro, nepre por la funkciado de la hospitalo.

La planko de la farmaciejo estas kovrita per luksa kverka pargeto kun centra mozaika suno.

La muroj estas kovritaj per kverko-paneloj de planko ĝis plafono. Multaj bretoj estas ornamitaj per lignaj kolonoj kun tordaĵoj. Ili surhavas la farmaciaĵojn de tiu epoko.

La plafono, el kaŝtanarba ligno, estas pentrita kiel falsa blanka kaj ruĝa marmoro sur blua fono. Ĝi estas dividita en 11 sekcioj kun dissemitaj oraj steloj.

Tiu ĉambro estis meblita kaj ekipita inter 1675 kaj 1700. Hodiaŭ ĝi ankoraŭ enhavas pli ol 600 diversajn ujojn, el ligno, vitro aŭ fajenco, kiuj estis uzataj por stoki kuracilojn.

Kelkaj ingrediencoj povas ŝajni strangaj aŭ amuzaj al ni hodiaŭ, sed ili estis uzataj kiel realaj medikamentoj de tiu epoko.

Ekzemple: drakosango, okuloj de kankroj, aŭ pulvoro de onisko, kun supozitaj multoblaj virtoj (kontraŭ ekstrema malforto, edemoj, gal- aŭ renŝtonetoj, podagro, kaj aliaj...)



Drako

Sed eble la sango de ĉi tiu drako rilatas al *Sangre de Drago*, arbo havanta ruĝan latekson?

### Serioze: Ĉu vi konas la «sangan de drako»?

Ĝi estas arbo de 10 ĝis 20 metroj alta, kiu havas ruĝan rezinon kaj kreskas en Amazonio, precipe en Ekvadoro, Peruo, Kolombio kaj Brazilo.

### Jen vegeta likvaĵo kiel bandaĝo!

La ruĝa latekso de «sango de drako» (*Sangre de drago*) - same kiel ĝia ŝelo - estas delonge uzata de indiĝenoj en Amazonio pro siaj multaj kuracpovoj.

Sciencaj studoj tiam venis por konfirmi la kuracpovon de la «Sango de drako» (*Sangre de Drago*).



Dum preskaŭ 300 jaroj la apoteko de Baugé estis administrata de apotekistinoj. Ili ĉerpis sian scion ĉefe el libroj kaj ankaŭ transdonis parole. La apotekistino respondecis pri provizado de la medikamentoj kaj preparaĵoj. Ŝi ankaŭ respondecis pri la transdono de kuraciloj al la malsanuloj. En la hospico la monaĥinoj akceptis malriĉulojn kaj malsanulojn kaj zorgis pri iliaj korpoj kaj animoj. Tamen nek gravedulinoj, nek infanoj malpli ol 7-jaraj estis akceptitaj.

Fine de la 18-a jarcento, la hospitalo akceptis pli ol 600 malsanulojn jare. La lastaj malsanuloj estis transportitaj el la hospitalo fine de la 20a jarcento.

### Unika kolekto

La apoteko de *Hôtel-Dieu* de Baugé posedas unikan kolekton de ujoj, botejoj, kruĉoj, kestetoj, el ligno, fajenco aŭ vitro. Inter tiuj objektoj, ekzistas aroj el Liono aŭ Italio, kiuj datumas de la 16-a jarcento kaj havas grandegan valoron.

La ujoj estas specifaj laŭ sia uzado kaj la tipo de la medicinaĵoj.  
Ekzemploj: (*Kiu el vi unue montros al ni la ĉi sekvajn ujojn?*)



**Silenoj:** estas kestetoj el kaŝtandarba ligno por la konservado de plantaj, mineralaj, kaj sekigitaj bestaj eroj. En Baugé estas pli ol 140 el ĉi tiuj kestetoj.



**Albarelli** kaj **kanonpotoj**: Fajencaĵoj por la konservado de solidaj materialoj aŭ pastaĵoj, kiel balzamoj, unĝventoj, aŭ kataplasmoj.

La **Albarelli** estas medikament-vazoj, kreitaj en Italio dum la Renesanco. La vorto **albarelli** havas kontestatan etimologion. Ĝi devenas aŭ de la latina vorto « *albaris* » kiu povas signifi blankeca aŭ ligna, aŭ de la araba « *albirmil* », de kiu ankaŭ devenas la vorto barelo.

**Kanonpoto** (*Pot canon*) estas tiel nomata pro sia aparta formo, kiu havas similecon kun la buŝo de kanono.



**Pilolujoj**: estas potetoj por la konservado de piloloj kaj pulvoroj.



Boteloj nomataj « *chevrettes / kapridinoj* » por siropoj, oleoj, kaj likvaj preparaĵoj. La simileco de ilia verŝilo kun la korno de kaprido donis al ili tiun nomon.



Boteloj el blovita vitro, kiuj enhavas diversajn plantajn alkoholatojn (laŭ PIV = *Distilaĵo de alkoholaturo.*)



## MEDICINO KAJ FLEGADOJ EN LA 17-A JARCENTO

### 3 - Ĉambro de la malsanulinoj nur por virinoj.



La hospico estas disigita en du ĉambregoj, apartiginte virinojn disde viroj. Ĉi tie estas la ĉambro rezervita por virinoj. Ĉiu malsanulo disponis pri lito, truita neceso-seĝo, ĉelita mebleto, stanaj necesaj objektoj, kaj pura vestaĵo. La mebloj, la fermitaj litoj kaj la zorgaj objektoj donas ideon pri hospitalo antaŭ tri jarcentoj.

La malsanuloj ricevis kuracilojn, manĝaĵojn, kaj ĉiutagan spiritan atenton. Ĉiutage la urba kuracisto de Baugé vizitis la malsanulojn de la *Hôtel-Dieu* kun la ĉefa monaĥino kaj la apotekistino. Kaj post ĉiu ekzameno, li donis al ili por la bezonantoj recepton kun skribitaj rekomendoj kaj medikamentoj.

### La diagnozo de kuracistoj en la 17-a jarcento

Ni ne forgesu, ke inter la plej kutimaj medicinaj praktikoj de tiu tempo, oni rekomendis sangeltiradon kaj drenadon (PIV: *dreni = ebligi la elfluon de likvaj amasoj aŭ per dreniloj, aŭ per meĉoj*).

La diagnozo de kuracistoj en la 17-a jarcento baziĝis sur palpado de la pulso, observado de la urino, detala analizo de la ĝenerala stato de la paciento kaj ties ĉirkaŭa medio.

La scioj, ĉefe el Antikvaj tempoj, miksiĝis kun spirita doktrino kaj mezepokaj tradicioj. Inter tiuj scioj, la teorio pri tiel nomataj «humoroj» okupas gravan lokon. Transdonita de Hipokrato, tiu teorio pri «humoroj» klarigas, ke la korpo estas reguligata de kvar «humoroj». Tio estas la kvar organaj likvaĵoj: sango, limfo, flava galo kaj nigra galo. Homo bone fartas dank' al ekvilibro de tiuj fluidoj. (*fluido laŭ PIV = Subtila energio, kiun iuj opinias emaniĝanta el la vivantaj kaj pensantaj korpoj*). Tiuj «humoroj» rilatas al la naturo, la elementoj, kaj fine ankaŭ al la temperamenta stato de la malsanulo. Tiu vidpunkto pri malsano kaj homa korpo naskis tion nomatan «evakuanta medicino». Kuracadoj, kiel sangeltiroj, drenadoj, englutoj de diuretiko, laksigiloj, vomigiloj, aŭ ŝvitigiloj, devas helpi ripari la ekvilibron, favore la forigon de la malbono.

### Konklude, malfermo al la ĝardeno

Ĉi tiu vizito ne povas esti finita sen trairi la ĝardenon, kie la kuracplantoj estas kultivitaj. Ĉi tiuj kuracplantoj poste estis ofte forgesitaj (neglektitaj?).



Por prepari la kuracilojn, la komunumo prizorgas ĝardenon de medicinaj plantoj. Uzotaj freŝaj aŭ sekigitaj. La kuracaj plantoj estas plantitaj en bedoj respektante precizan ordon. La ĝardeno estas bazita sur la teorio de la «humoroj». Ĝi estas dividita en kvar kvadratoj, kiuj simboligas la kvar elementojn (akvo, aero, fajro, tero), regantajn la kvar «humorojn» de la korpo. Ĉio orientita laŭ la kvar ĉefpunktoj. En ĉiu bedo, plantoj estas elektitaj laŭ sia influo sur la «humoroj» kaj laŭ la medikamentoj konservitaj en la apoteko.

*Klodin'*





## **DIAGNOZO DE KURACISTO EL LA 17A JARCENTO**

*Monologo de Marcelo por la vizito de la apoteko en la hospico de Baugé  
SAT-kongreso 2023*

« Ha! kara sinjoro, jam via ĝenerala aspekto atestas iun malfortiĝon. Kaj krome vi plendas pro teruraj deprimidaj kapdoloroj. Hmm... Interese. Jen vera medicina enigmo iĝis vi, kara sinjoro. Venu do al mi, ke mi serĉu solvon por vi, ĉar mi, humila kuracisto el la 17a jarcento, turmentos propran cerbon por kvietigi la vian.

(...)

Nu, jes, mi bone komprenis, ke por vi tiuj kapdoloroj estas ne plu tolereblaj. Ja temas pri migreno. Forta deprimiga migreno, ĉu? Kaj vi pretas ion ajn provi por ĉesigi tiun suferon. Nu, interese... Ion ajn, vi diris, kara paciento. Bone, mi unue iom palpu vin. Jes, jes, palpi vin.

Ankaŭ vian pulson ĉe brako, bonvolu.

Dankon. (...) Hm... interese.

(...)

Nu, ni plu esploru viajn humurojn. Ne, humuron vi ne havas. Mi volis diri viajn kvar humurojn\*. Pardonu? Jes, viajn fluidojn: sangon, flavan kaj nigran galojn, - ne, pri galoj hodiaŭ ne, - kaj urinon.

Do jes, mi deprenu sangon de vi! (...)

Vi nun diras, ke tion vi rifuzas, tamen antaŭ momento, vi konsentis ion ajn provi. Nu, restas la urino.

Diligenta kuracisto el la 17a jarcento ne rezistas al alvoko de la urinoj!

Feliĉe la apotekistino diligente konservis vian matenan urinon. Gravas, ke ĝi estis kolektita antaŭmanĝe. Ĉu tiel estas? Vi certas? Bone. Tre bone.

Nu, ni rigardu de proksime por atentema analizo. Urino kapablas jam rivela-di multon pri la interna sanstato de homo.

Ek! Ni kontrolu la koloron: jen flaveverda, jen verdeflava, kun blueca rebrilo. Interese, ĉar jen pruvo pri malekvilibro de viaj kvar humoroj! Grava afero, ĉar laŭ scienca teorio, la kvar humoroj estas la elementoj, kiuj regas homan sanon. Ilian ekvilibron garantias nian bonfarton.

Do ni revenu al nia analizo de via urino kaj kontrolu ankaŭ likvecon – nu, flueca, bone - kaj odoron (*li tuj fortenas la ujon*) –. Oj! Pu! Fi! Fek’! Naŭze!... Interese.

Kaj fine ni kontrolu ankaŭ guston. Do, vi mem gustumu unue. Ĉu ankaŭ tion vi rifuzas? Tamen antaŭ momento vi asertis, ke vi pretas sperti plej modernan metodon kaj jam vi rifuzis sangodeprenon. Nu, bone kiel spertulo mi mem gustumos.

*(La kuracisto pinĉas sian nazon antaŭ ol ektrinketi.)*

Hm! Interese bongusta. Mi reprovu. Vere bongusta. Iom alkohola! Eble 14°. Interesege! (*Kaj li plezure eltrinkas la urinon*).

(...)



Kaj ĉar vi, kara paciento, evidente ne scias nun, kion plu fari, mi legu el la scienca librego...

(...)

Jen fakte, kion fari? Ni vidu. Ni trovu solvon. Kapdoloro = Migreno = Cefalalgio. Komprenoble Cefal - algio. Ho! Grave! Tre grave! Aĥ! jen! salvio kun rosma-reno... kaj salo aldone! Jen perfekta recepto por ekvilibrigi la humorojn. Ĉiumatene antaŭmanĝe englutu bovlon da infuzaĵo de tiu miksaĵo. Kaj por lukti kontraŭ deprimio, ĉiuvespere tizanon de hiperiko. Tre efikas hiperiko kontraŭ anksio, jam greka Hipokrato tion asertis. Jen kion vi bezonas, kara paciento.  
(...)

Pardonu? Ĉu aldone vi postulas, ke mi preskribu ankaŭ medikamentojn? Sed niaepoke kelkaj ingrediencoj de tiuj modernaj medikamentoj eble ŝajnos al vi strangaj, ekzotikaj kaj vi suspektos ilin neefikaj... Nu, bone, bone. (*Li foliumas sian libregon*). Sub via insisto mi aldone preskribas miksaĵon de vesperta flugilo kun okuloj de kankroj kaj salivo de bufo.



*Fama kuracisto en la ĝardeno de la «simpluloj\*\*\*» (Jardin des simples) de la hospico.*

Aĥ! jen mi sentas, ke jam dubo trafas vin. Ja, ja mi tion sentas. Tamen vi devas kompreni, ke niaepoke, ni nepre fidu tiajn ingrediencojn, eĉ se ili ŝajnas neseriozaj; ĉar se ion mi lernis kiel kuracisto, tio estas, ke plena fido kaj konvinko estas nepraj en la kuracarto.

(...)

(*konklude ridetante*) Tial, kara paciento, vi trinku tiun miksaĵon ĝis lasta guto kun **espero**, ke viaj kapdoloroj malaperos. Fide esperu! Iĝu senduba, konvinkita esperanto! Eĉ unua esperanto-isto! Kaj estu serena, ĉar mi akompanos vin tra tiu nova, unika medicina sperto! (Ve-sperto laŭ klaĉulino\*\*.) Kaj memoru, ke tempoj ŝanĝiĝas, tamen nia strebo al plibonfarto de la homaro restas senŝanĝa! »

--- saluto ---

\* En la franca lingvo de la 17a jarcento la vorto «humeurs» signifis likvaĵoj. Ankaŭ en la tiama Esperanto. Tamen ĝi evoluis. Ne nur tempoj ŝanĝiĝas...

\*\* Janine!

\*\*\* Ne simpluloj sed kuracaj plantoj. Bonvolu pardoni tiun denovan laŭvortan mistradukon en pratempan Esperanton.

Marcelo




« *Mi scias, ke mi scias nenion!* »

**Sokrato**

En La Apologio de Sokrato kaj la Menono de Platono (4a jarcento antaŭ Kristo)



Ĉiu opinias bone koni la fakon de sia kompetenteco, kaj ofte firme asertas pri kio estas vera aŭ falsa, bona aŭ malbona, bela aŭ hida. Tamen Sokrato pridemandas ĉiujn, ĉefe tiujn, kiuj pretendas ĉion scii, kaj al ili plezure demonstras ilian ignorecon. Ekzistas nedubebaj ideoj kaj absolutaj valoroj, sed por esperi malkovri ilin, necesas unue kuraĝi konfesi sian ignorecon.



<https://www.philomag.com/bac-philo/10-grandes-citations-philosophiques-decryptees>



## NIAJ KURSOJ

- En **CENON** (Mediateko Jacques Rivière), ĉiun lundon inter la 14a kaj la 17a, Marcelo REDOULEZ animas tradukgrupon. (05 56 21 38 64)
- En **UNIVERSITATO BORDEAUX MONTAIGNE**, en salono D-009, ĉiun mardon de la 17a30 ĝis la 19a, kursojn gvidas Elvezio helpe de Jean-Seb. (06 72 17 22 97)

## ĈU VI KONAS «BLOBON»?

Post plurjara sekegeco pluraj arboj de nia ĝardeno malsaniĝis aŭ rompiĝis. Do arboflegisto venis por ilin fortranĉi kaj li per maŝino dispecetigis la stumpojn kaj dikajn branĉojn .

Post kelka tempo mi iam malkovris sur iu el la amasoj da lignopecetoj tre strangan aĵon. Unuavide, ĝi iel similis al flaveca vomitaĵo! Povis temi pri ia novspeca fungo, kiu kutimas kreski sur tiaj amasoj kaj iom post iom kontribuas al la transformado de lignopecetoj en humon.

Do mi esploris la reton, serĉante per «fungo, kiu similas al flava vomitaĵo»... kaj mi efektive trovis, ke io ekzistas, kies vulgara nomo estas «hunda vomitaĵo». Oni ĝin nomas ankaŭ «Blobo». Sed la scienca genra nomo estas «miksomiceto»<sup>1</sup>... kaj ĝi tute ne estas fungo!

Mi rimarkis, ke tagon post tago la koloro de la aĵo evoluas de flaveca aŭ okreca ĝis grizeca, kvazaŭ ŝimkolora, kaj fine restas nur sufiĉe dika nigra polvo. Plej mirige estis konstati, ke kiam ĝi estas «juna» ĝi iom post iom etendiĝas, kaj ne plu kreskas kiam ĝi «velkas».

Tio okazis plurfoje sur la sama lignopeceta amaso kaj instigis min scii iom pli pri tiu stranga estulo.



### BLOBO

#### **Physarum Polycephalum**



Blobo reproduktiĝas pere de sporoj kaj vivas en subarbaroj, tamen ĝi ne estas fungo; ĝi migras kaj solvas problemojn, tamen ĝi ne estas besto; ĝi aspektas kiel musko, tamen ĝi ne estas vegetaĵo. Do kio estas blobo? Tiu giganta unuĉelulo kun eksterordinaraj kvalitoj fascinas esploristojn en la tuta mondo.

Ĝi similas al granda flaveca ŝaŭmo, kiu multobliĝas en arbaroj, kiam la vetero estas humida. Ĝia scienca nomo estas **Physarum Polycephalum**. Ĝi estas miksomiceto, aperinta sur Tero antaŭ ĉirkaŭ unu miliardo da jaroj. Blobo konsistas en unu giganta ĉelo, kiu entenas plurajn kernojn, kies grandeco povas atingi plurajn kvadratajn metrojn.

En la naturo ĝi nutriĝas per bakterioj kaj fungoj. Por migri, ĝi uzas vejnojn nomatajn «pseŭdopodoj» (t.e. pseŭdopiedoj) en kiuj la irreira movo de la citoplasmo ebligas ĝin atingi rapidon de 1 ĝis 4 centimentroj hore.

La kromnomo «blobo» devenas de sciencfikcia filmo *The Blob* (1958), en kiu gelatena maso kun eksponenciala kreskado kolonias la planedon, ĉion englutante sur sia vojo. Ne timu, **Physarum Polycephalum** ne estas minaca invadanto, ĝi estas absolute sendanĝera. Tamen ĝi kunhavas iujn kvalitojn kun sia homonimo. Ekzemple **Physarum Polycephalum** havas eksponencialan kreskadon: ĝi povas duobliĝi ĉiun duan tagon. Cetere blobo estas preskaŭ nemortonta. Kiam la mediaj kondiĉoj estas al ĝi malfavoraj, ĝi komencas procezon de sekiĝo kaj sin tenas en dormostato sub formo de skleroto<sup>2</sup>. Tiu dormostato povas daŭri plurajn jarojn, ĝis kiam parametroj de humideco kaj disponebleco de nutraĵoj estos denove kunigitaj, por ke blobo eksponencie rekresku. Blobo posedas ankaŭ la rekordon en kategorio cikatriĝo. Se oni ĝin dispecigas, ĝi regeneriĝas en nur du minutoj kaj formas plurajn klonajn blobojn.



Tiu organismo tre simpla kaj sen nerva sistemo estas tamen dotita per miriga lernkapablo. Por tion ilustris, esploristoj disvolvis eksperimenton, en kiu repela kaj sendanĝera substanco, kinino, estas metita inter la blobo kaj ĝia nutraĵfonto. Unue la blobo estas hezitema. Poste, en kelkaj tagoj, ĝi asimilas, ke eblas aliri al la nutraĵo tra la kinino, ne endanĝerigante. Tiu lernprocezo nomiĝas alkutimiĝo kaj unuafoje oni ĝin observas ĉe unuĉela organismo. Ĝi necesigas iuspecan memorkapablon. Efektive blobo instruiĝas per siaj vivspertoj kaj adaptas sian sintenon al sia medio. Plie estis pruvite, ke la bloboj lernintaj per alkutimiĝo venki iun obstaklon kapablas transdoni siajn informojn al naivaj bloboj, ilin igante kapablaj venki tiun obstaklon, kiun tiuj neniam antaŭrenkontis.

Blobo kapablas ankaŭ solvi kompleksajn problemojn, scipovas trovi la plej mallongan vojon inter pluraj nutraĵfontoj disigitaj per obstakloj. Tiel esploristoj volis kompari la kapablecon de blobo plejbonigi sian vejnan reton kun nia kapableco plibonigi komunikvojojn. Metinte blobon sur kopion de mapo de la regiono de Tokio, sur kiu ĉiu urbo estis konkretigita per avena floko, la blobo disvolvis vejnan reton pli efikan ol la nuna fervoja reto de la Tokia regiono!

La reproduktiĝo de blobo estas miriga. Ĉe homo estas du genetikaj kombinaĵoj, kiuj difinas sekson: XX (virino) aŭ XY (viro). Blobo estas nek maskla nek femala, ĝi reproduktiĝas per sporoj kaj povas havi 720 seksajn tipojn. Sporoj ĝermas kaj eligas ameboidajn<sup>3</sup> ĉelojn, kiuj havas 719 ŝancojn el 720 esti el la «mala» sekso kaj povi kunfandiĝi por formi individuon, kiam ili renkontiĝas.

Nia korpo entenas 10 000 miliardojn da ĉeloj, kiuj kunlaboras por garantii supervivon en nia medio. Iuj estas specialigitaj pri lernado aŭ komunikado, aliaj pri reproduktiĝo, aliaj pri digestado... **Physarum Polycephalum** kapablas plenumi ĉiujn ĉi funkciojn en ununura ĉelo. Ĝi tial estas tre interesa studmodelo por esploristoj. La vejna reto de **Physarum Polycephalum** estis pristudita por disvolvi algoritmojn kapablajn plejbonigi niajn telekomunikadajn retojn. Blobo povus ankaŭ havi uzajn en homa medicino. Ĝi ekzemple produktas malgrandan polimeron<sup>4</sup>, kiu povas esti uzata en la precizcela transporto de medikamentoj kaj partopreni en plejbonigo de la nunaj kemiterapioj.

Nu, ĉu ne mirige ŝirmi tian mirindaĵon en sia ĝardeno?

Fonto de la sciencaj informoj: <https://www.simplyscience.ch/fr/jeunes/decouvre/blob-vous-avez-dit-blob>

*Janine*

---

<sup>1</sup>miksomiceto: (PIV) Ĉefa klaso (Myxomycetes) de miksomikotoj. Miksomikotoj (Myxomycota) estas filumo de unuĉeloj aŭ plasmodiaj, senkoloraj vivuloj, kiuj malrapide migras sur la substrato (grundo, malnova ligno, ŝelo, ktp) kaj post ripozo transformiĝas en sporujojn.

<sup>2</sup>skleroto (PIV): Solida hifamaso, ofte ronda, normale senspora, ripozorgano de multaj fungoj. Hifo estas elemento de funga micelio.

<sup>3</sup>ameboida (PIV): Simila al amebo (protozoo, kiu moviĝas per pseŭdopodoj kaj vivas en akvo, malseka tero, aŭ parazitigas en diversaj animaloj)

<sup>4</sup>polimero (PIV): Tre longa molekulo, konsistanta el multaj meroj. Mero estas baza, ripetiga kemia radiko, konsistaĵo de pli-malpli granda kunmeta molekulo,





## ĜARDENADO

**D**e ĉiam intima ligo unuigas homon al ĝardeno, ligo kreita kaj rekreita laŭ petoj de la homoj rilate al naturo, ligo kiu donis diversajn stilojn al la arto de la ĝardenoj, laŭflue de jarcentoj. Tion ni forgesis, sed la ĝardenisto tion memoras, kiam li enprofundigas la manojn en la teron, ekzemple, aŭ kiam li miras pro ĝojo vidante la arbon kiun li ĵus plantis bone ligita al sia paliseto kaj preta por sia nova vivo.

Ni ankaŭ memoras tion kiam, iafoje, sen scii kial, ni malfermas la portalon de iu ĝardeno kun la sento, ke io alvokas nin; io kio apartenis al ni, pri kio ni eĉ ne konsciis, ke ĝi estis perdita.

**Marco MARTELLA-*Un petit monde -Un monde parfait***

« Lokante la gravitocentron de la homo ekster li, en la spaco samtempe intima kaj mistera de la vivmedio, la ĝardenado, almenaŭ dum la tempo dediĉita al tiu agado, ebligas lin trovi perditan kvietecon.

De ĉiam naturo helpas nin. Se ĝi ne povas kuraci nian vivdoloron, ĝi kvietigas, mildigas, provas restarigi ekvilibron, sin memorigante al ni. Kaj senĉese, patrinece, ĝi renovigas siajn zorgojn.

Ve, ni de longe forgesis ĝin. La pseŭda sovaĝulo, kiu vivas en la profundeco de Afriko aŭ Amazonio, tiu ja scias. Li identigas la plantojn dank' al iliaj odoroj aŭ formoj, kiam li piediras en arbaro, ĉar ili estas familiaraj, li nur bezonas klini sin por ilin kolekti kaj meti ilin en sian sakon.

Ankaŭ la ĝardenisto, eĉ se li malofte havas tempon aŭ emon sin pridemandi pri tiel gravaj temoj, neniam forgesis, ke la vera domo de nia animo estas en la vasta mondo. Ja pro tio li dediĉas tiom da tempo kaj tedaj streboj al tiu agado, la ĝardenado, ŝajne iomete ne utila.

Atente observu nian ĝardeniston Samuel. Observu lin metantan teren junan planton kun delikata tigo. Ŝajnas li somnanbulo, tiom li estas absorbita de sia tasko, sed liaj sensoj estas alarmpretaj. Li estas feliĉa nur, ĉar tio, kio interesas lin nun, estas tiu eta vegetaĵo, tiu fragila decido vivi, kiun li tenas inter siaj fingroj. Li forgesis sian feliĉserĉadon, kiu obsedas lin tag-nokte en sia ĉiutaga vivo, ĉiam trompita, kaj ankaŭ siajn malfeliĉojn. Li sin mem forgesis. Lia spirito, kiel dirus taoista saĝulo, estas nur vaka spaco, spaco senĉese trairata de la vivenergioj – vento, lumo, poleno, zumado de insektoj, kaj kio do ankoraŭ... Nuntempe li unuigas kun tiu eta mondo, pri kiu li respondas, kun tiu tribo de plantoj kaj bestoj, kiuj loĝas en la ĝardeno. La cetero ne estas grava por li. Se ni interrompus lin por peti de li la kialojn, kiuj instigas lin prizorgi sian ĝardenon kun tiom da sindonemo, genuojn en la grundo, necesus al li kelkaj minutoj por rekonsciiĝi kaj respondi. Povas esti, ke li eĉ forgesis sian nomon, ĉar nun li estas neniu. Lia feliĉo estas perfekta. Ni ne perturbu lin.»

***(Jorn de Percy, angla-islanda ĝardenisto – eltirite el la libro de Marco Martella -Un petit monde – Un monde parfait).***

Monique

## FASCINAJ LUPOJ 3/3



*Upuaut aŭ Upuat, egipta dio kun lupa kapo, gvidas la sunon dum ĝia nokta itinero, kaj sekve funebre «malfermas la vojojn» por la animoj de la mortintoj*

### La lupoj - mito!

**E**n la du antaŭaj LEGI eble kaptis vian atenton la prezento de nutra ĉeno en la usona nacia parko Yellowstone provinco pravi, ke lupoj ŝanĝis fluon de riveroj (en nro 170). Jen natura historio, tro bela laŭ la skrupula kontraŭ-argumentaro de Gerardo Guillot (en nro 171). Konklude jen fina parto de tiu trilogio pri tiuj fascinaj lupoj.

Kiel kaj kial amaskomunikiloj kondukis la aserton de usonaj sciencistoj pri la lupoj de la parko Yellowstone al statuto de falsa dogmo? Ĉar la lupoj, ĉefaj rolludantoj, interesas ĉiujn homojn, naskante malsamajn emociojn. La rilatoj inter lupoj kaj homoj datumas jam de la prahistorio. Lupaj siluetoj desegnitaj dum la neolitika tempo videblas sur kavernaj rokoj. Lupo troviĝas en multaj mitologioj: egipta kaj grek-romia, vikinga, mongola, indiana, inuita, barata kaj ceteraj. Ekzemple, lupino estas bazo de la fondiĝo de Romo, adorata de la civitanoj de la Imperio. Tie simbolo pri fekundeco, aliloke pri krueleco. La sintenoj rilate la lupojn estas ambiguaj pro la samtempaj fascino, respekto kaj timo, kiujn elvokas de ĉiam tiu lerta predanto. Antaŭ ol lupoj estu deklarita kiel noce danĝera, prestiĝo estis enkalkuli ĝin kiel familian praulon. Lupoj fascinas homojn pro sia socia organizo kaj siaj fizikaj elten-kapabloj.



Tial, la ideo asertanta, ke lupoj favoras ekosistemon, devige tuj plaĉas al multnombraj antaŭkonvinkitoj. Jen kroma kialo por protekti ilin. Sed reale lupoj estas nek bonaj, nek malbonaj por la ekosistemo. Ili estas kaj meritas esti, ekzisti kiel ĉiu ajn vivanta specio.

Same al plimulto plaĉas la ideoj pri reguligo dank' al la supera aganto de la nutra ĉeno kaj pri la mita ekvilibro de la naturo. Sed oni nun scias, ke ĉi-lasta malnova koncepto de klimakso estas erara. Fakte la diversaj faktoroj senĉese evoluas laŭ malsamaj vojoj kun daŭre novaj (f)aktoroj kaj neantaŭvideblaj perturboj: ni troviĝas en stato de dinamika malekvilibro kun la medio. Tio sonas malpli komforta ol la fama ekvilibro. Tamen la komplekseco de la interagoj en ekosistemo devus ravi nin, anstataŭ timigi nin.

Gravas ankaŭ kompreneble la rolo de amaskomunikiloj, kiuj deziras plaĉi al larĝa publiko. Tial ili favore eldonas jen ravajn historiojn, jen ŝokajn novaĵojn, sed male entute prisilentas malpli spektaklajn kontraŭdirojn aŭ longe strukturitajn argumentojn.

La sciencistaro, pli ol ĉiu ajn alia homgrupo, nepre estu singarda kaj ekzemplodona, rilate elsendon de informoj nur objekte pruvitaj. Ununura skipo studente ununuran kazon ne povas sufiĉi por fondi novan teorion. Sekve tiu teorio devas enkalkuli ĉiujn poste reliefigitajn korektojn aŭ limigojn. Ĉefe tiu punkto tre tiklas koncerne la lupojn, kiuj ŝanĝas riverojn, ĉar ne ĉio falsas en la konkludoj de tiu esploro.

Gerardo Guillot mem pretis enŝovi la informon pri la influo de lupoj en la parko Yellowstone en propran artikolon, kiun li verkis pri boacoj kaj poploj en Skandinavio (franclingva kroniko), kiam li ricevis libron pri la novaĵoj falsaj aŭ mispruvitaj en la naturprotekta medio. Kaj foliumante ĝin, li legis pri tiu historio, kiun li kredeme taksis veraĵo. Konsterniĝe!

El ĉio tio, ni nepre lernu pli ol iam ajn esti tre atentemaj (des pli se ni ne estas fakuloj) kaj pli modestaj en niaj vortoj. Ni eble ankaŭ ne facile kreu tro belajn naturajn historiojn: naturo kaj simpleco videble ne vere simbiozas!

*Marcelo kaj Klodin'*

-----(fino)---



**ESTRARO**  
**de**  
**«ESPÉRANTO-GIRONDE»**

\* \* \* \* \*

**Médiathèque Jacques Rivière**  
**2 avenue du Président Vincent Auriol**  
**33150 CENON**

\* \* \* \* \*

Prezidanto: **Elvezio CANONICA**  
Université de Bordeaux Montaigne

UFR Langues,

Domaine Universitaire, Esplanade des Antilles,  
33600 Pessac

Tel: 06 72 17 22 97 / [canonica.elvezio@orange.fr](mailto:canonica.elvezio@orange.fr)

Sekretariino: **Janine DUMOULIN**

2, chemin des Nauves

Chardes 17130 MONTENDRE

Tel: 05 46 49 07 46 / [janinedum@neuf.fr](mailto:janinedum@neuf.fr)

Kasistino: **Martine EDELBOUDE**

2 rue Raymond Lavigne

33100 BORDEAUX

Tel: 06 73 34 81 88 / [mabel1533@laposte.net](mailto:mabel1533@laposte.net)

\* \* \* \* \*

**Kontribuojn por LEGI bv. sendi al [janinedum@neuf.fr](mailto:janinedum@neuf.fr)**  
**aŭ al [esperanto.gironde@free.fr](mailto:esperanto.gironde@free.fr)**

**La venonta kunveno de Espéranto-Gironde okazos**  
**la 24an de septembro je la 10a 30 en Cambes (33880),**

**135 chemin de l'Hortie,**  
**ête Marcelo kaj Klodin'.**

